

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio :

Box 731, Elizabeth-str. P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj) :

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 penco.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj

Unu numero: 4 penco

Anoncoj: Por 3 linioj: 1 ŝilingo.

N-ro 50

Melburno (Melbourne), Australio.

10 aŭgusto 1924

PRI AU'STRALIO.

Doktoro George Horne akiris interesajn rekordojn, (por gramofonaj diskoj), de la kantoj kaj parolmaniero de la indiĝenoj, dum esplorveturado en Centran Aŭstralion.

Aera poŝta servo inter Sidnejo kaj Adelaido komenciĝis la 2 de junio. La aervojo estas en rekta linio inter la du urboj, sed la trajna vojo sekvas du flankojn de triangulo. La trajno okupas 41 horojn dum la efektiva flugtempo estas nur 4½ horoj.

Tre sukcesa eksperimento okazis la 31 de majo, kiam parolanto en Poldu, (Anglujo), aŭdiĝis en Sidnejo, (Aŭstralio), per senfadena telefonio. Konversacioj sekvis dum kvar sinsekvaj tagoj inter Poldu, la jaŭto de s-ro. Marconi, (tiam sur la maro Mediteranea), kaj Sidnejo. La metodo ne estis la mistera "beam" sistemo, sed, laŭ s-ro. Marconi, tute alia metodo devininta el tiu eltrovo. Oni ĉie preparolas la eksperimenton kiel mirindaĵon.

Ĉar la kvanto de kelonioj, (latine: chelonia), en Ameriko videble plimalgrandiĝas, oni nun rikoltos el la riĉa provizejo de nord-okcidenta Aŭstralio. Ĝis nun la pogranda kaptado de kelonioj estas malpermesita, sed nun la Lacepede Products Company, de Melbourne, ricevis permeson ekspluati 75 mejlojn de la marbordo apud la golfo Beagle. La kompanio vendos siajn ekstraktojn de la viando, supon, oleojn kaj ŝelon tra tuta la mondo.

KONGRESAJ AFEROJ.

Dum la pasinta monato la kasisto, s-ro H. Byatt, ricevis la jenajn sumojn:—n-ro 2, L. Pfahl, 10/6; n-ro 6, J. G. Pyke, 21/-; n-ro 7, M. Fraser, 10/6; n-ro 8, f-ino Higgins, 21/-; n-ro 9, R. Rawson, 21/-; n-ro 10, H. Byatt, 21/-; n-ro 11, H. N. Conwell, 21/-; n-ro 12, s-ro Serpell, 11/-; n-ro 13, J. Davidson, 21/-; n-ro 14, W. L. Waterman, 10/6; n-ro 15, S. Harris, 10/6; n-ro 16, D. Anderson, 21/-; n-ro 17, P. White, 31/-; n-ro 18, P. T. Hudson, 21/-; n-ro 19, f-ino Mitchell, 21/-; Donacoj Walking Club, 22/-; E. G., 5/-; W. L. Waterman, 10/6; S. Harris, 10/6; Melbourne Esperanto Club, pere koncerto, £4/14 9; Malvern Girls' Club, 7/-.

La organizantoj celas aldoni al la listo almenaŭ dudek nomojn ĉiu monate. Samideanoj rapide sendu vian kongresajn pagojn, por ke vi faciligu la laboron de la laborantoj.

Esperantistoj, kiuj volas esti ekzamenataj, bonvolu noti, ke la kongresaj organizantoj jam decidis aranĝi ekzamenojn por komencantoj kaj progresintoj laŭ la reguloj de la Brita Esperanta Asocio. La sidloko estos ĉe Melbourne, dum la kongresaj tagoj. Kandidatoj devos sendi la jenajn pagojn:—Atesto por komencantoj 3/-, Diploma por progresintoj 5/-. Ni petas, ke tiuj kiuj intencas esti ekzamenataj sciigi la Sekretarion, kiel eble plej baldaŭ.

METALURGIO.

Sensacia eltrovo.

Oni scias kiom malfacile tranĉeblaj estas la metaloj, eĉ per ĉizelegoj kaj segiloj; kaj do delonge oni uzas por tio la oksidan lampon (blovtubon), kiu ne tranĉas, sed disfandas la materion. La metodo tamen ne estas sen ia malutilo, ĉar ĝi bezonas 700 centigradan varmon kaj difektas la apudan randmetalon.

Novaj eksperimentoj ĵus altiris atenton al juna franca inĝeniero el Lyon, s-ro. Roger, kiu eltrovis novan procedon farantan en estonteco grandan servon al la metalurgia praktiko kaj konstruado. Ĉi tiu nova, per oksigeno kaj hidrogeno provizita blovtubo, kiun oni nomas oksidanta flamo, tranĉas la plej harditajn ŝtalajn laŭ miriga facileco kaj rapido. La varmogrado tamen ne superas 25%, kaj ĝi efikas sub akvo same kiel en libera aero; la eta flameto eliranta el la tubopinto enpene-tras la metalon kvazaŭ tranĉilo en sapon aŭ buteron, distranĉante ĝin laŭ neta streko kaj sen ia difektaĵo.

Jam antaŭ kelkaj jaroj estis fari-taj kontentigaj laboratoriaj provoj; sed nun por la unua fojo la spertoj okazis pogrande en Toulon je la sub-marŝipo Liberte (Libereco), kiu subakviĝis post eksplodo antaŭ 12 jaroj. Efektive, por relevi la tro pezan amasegon, oni decidis detranĉi ĝian kirason kaj oni uzis por tio la novan blovtubon de s-ro. Roger. La afero tute sukcesis: estis ja mirinde vidi kiel efikas la maldika flameto facile flirantanta sur la ŝirmkiraso kvazaŭ koboldo. Sufiĉis 45 minutoj por detranĉi 420 tunojn da ŝtalplatoj 18 mm dikaj, laŭ longo de 15 metroj.

Kiel klarigi tiun rezulton? Plej freŝajn ekkonojn pri la strukturo de la materio oni elvokas. Scienculoj prezentas multajn hipotezojn, kaj opinias, ke la feliĉa eltrovinto sukcesis ricevi gasan miksaĵon, kiu kapablas dismeti kaj detruigi la internatoman energion de la koncerna metalo.—Pluaj teknikaj esploroj estas daŭrigataj por plene klarigi la kialojn.

(A. Esselin, Nancy, en "Esperanto Triumfonta.")

NIAJ LERNANTOJ.

Tio, kion oni akiras senlabore, ne estas tute ŝatinda. Same, se oni akiras ion senpage, tio ne alportas kontenton. Ĉu vi konsentas la proponon, ke tiu, kiu volas ellerni Esperanton aŭ iun alian lingvon, devu pagi, por ke li pliperfektigu je la lingvo.

Se Esperanto estas lerninda, kompreneble tio estas paginda. Mi kuraĝas eldiri mian opinion pri tiu plej grava sugesto.

Sendube la prava metodo pro disvastigi Esperanton estas pagigi la lernonton. Laŭ la vidpunkto de instruistoj, tiu proponata pago tute estas justa. Plie, preskaŭ ĉiuj sindonemaj instruistoj volonte faras la senpagan laboron ĉe ĉiu klubo jaron post jaro. Estas memorinde, ke ili facile povus meriti salajron, se ili anstataŭigus vespere hejmlaboradon aŭ alian okupon.

Entute mi opinias, ke estas dezirinde, tute ŝanĝi la instruadan metodon.

Tial, por eltiri opinion el aliaj Esperantistoj, mi proponas, ke estonte ĉiu lernanto, kiu volas ellerni Esperanton, devu pagi po dudek unu ŝilingoj por kurso, kiu daŭros dum tri monatoj, po du horoj da instruado en ĉiu semajno.

La mono ricevita estos dividota jene: dek ŝilingoj al la instruisto, kvin ŝilingoj por helpi pagi la luon, kaj ses ŝilingoj por kotizo sole por propagandi Esperanton. Certe al mi plaĉus scii aliajn opiniojn koncerne la supre skribitan temon.

HO BO.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Ĝis la 28 julio ni ricevis la jenaj sumojn:—J. Dobrich, 5/6, julio '25; A. Ryan, 4/6, junio '25; M. J. Ravell, 10/-, majo '25; Grupo Esperanto, 4/6, junio '25; J. Mader, 5/3, julio '24; J. B. Galloway, 4/6, marto '25; A. M. Hopton, 4/6, junio, '25; Amikino, 7/-, junio '25; M. Martinek, 4/6, junio '25; C. L. Clarke, 4/6, junio '25; Pro Homan, 20/-, aŭgusto '25; D. Gilbert, 1/-; A. McKenzie, 4/6, julio '25; W. A. Marshall, 4/6, aprilo '25; kontantaj, 6/2; H. Ballentyne, 6/6, julio '25.

HISTORIA KVERKO.

Kreskanta ĉe "Merino Downs, Henty," okcidenta distrikto de Viktorio, estas kverko, unu el la plej maljunaj en la ŝtato, plantita de fratoj Henty; post la alveno tien antaŭ naŭdek jaroj.

"Merino Downs" estis la unua enlanda ŝafbredejo elektita en la Portland distrikto, kaj nun parto de la ŝtato de Viktorio. Ĝi ĉiam estis fama ŝafbredejo, kaj ĝis 50,000 ŝafoj jare estas tondataj.

La malnova hejmbieno ankoraŭ restas, kie loĝas la filino de s-ro F. Henty. En la bela ĝardeno kreskas hodiaŭ granda kverko plantita . . . sed lasu la arbon mem rakonti sian historion . . .

—Mi estis eta glando alportita el Anglujo trans 12,000 mejloj da oceano, de la fratoj Henty, kiuj deziris ĉe ili memoraĵon, pri la lando, el kiu ili venis, kiel pioniroj. Baldaŭ post la loĝiĝo tien ĉi, ili decidis havi ĝardenon, kaj plantis min kun la espero, ke miaj branĉoj poste donos ombron kaj ŝirmon, kaj taŭgan ĉirkaŭaĵon.

—Nu, do, mi ne rapide aperis, kaj oni timis, ke mi mortos. Feliĉe tiel bone efikis la (zorgo) donita al mi, ke mi kreskis, kvankam mia kreskado, kompare al la Aŭstraliaj arboj estis malrapida.

—Kiom da loka historio mi povas memori. Ĉu vi scias, ke la fratoj Henty posedis la unuan magazenon tie ĉi en la jaro 1838? Ĉu vi scias ke ili provizis preskaŭ ĉion, eĉ en tiuj fruaj tempoj?

—Eble vin interesos la prezoj de komercaĵoj en tiuj tagoj, tial mi donas prezliston tiaman de la komercaĵoj vendataj en la jaro 1838, malproksime malpli ol cent jardoj de kie mi nun kreskas. Tabako ok ŝilingoj por funto, sukero ok pencoj por funto, paro da botoj dekse ŝilingoj, teo ses ŝilingoj por funto, ĉemizo por laboristo tri ŝilingoj kaj ses pencoj, pulvo kvin ŝilingoj por funto, indiĝenaj hundoj ok ŝilingoj kaj ok

pencoj por unu, paro da lanaj litkovriloj dudek ŝilingoj, ŝapo unu ŝilingo por bloketo, aveno ses ŝilingoj por unu buŝelo, terpomoj dek ŝilingoj kaj dek pencoj por kvintalo, tridek unu kaj duono funtoj da ŝafaĵo por ok ŝilingoj po ses argilaj pipoj por naŭ pencoj, ŝaftondiloj tri ŝilingoj, funto da ŝnureto por ok ŝilingoj, kanguru-feloj sep ŝilingoj por du.

—Eble vi miras pro la malkaraj prezoj de kelkaj komercaĵoj cititaj, sed vi devos pensi pri la tiama monvaloro; la salajro en tiuj tagoj estis nur tridek ŝilingoj semajne.

—Ne ekzistis tiam bone faritaj vojoj, sed nur tiuj faritaj de la fratoj Henty mem, kaj uzataj de la veturigistoj de laborbovaro.

—Bone mi memoras, kiam konstruiĝis la unua fervojo en la jaro 1884. Sed eble vi nun ŝatos aŭdi ion pri mi mem. Iun tagon, kiam s-ro Henty kaj amikoj trinkis teon en la ombro de miaj branĉoj, li diris,—tre interese estos, se ni konservos kronikon pri la mezuroj de la kverko—Ili havigis mezurrubandon, kaj tion faris, kaj hodiaŭ ĉe "Merino Downs" oni povas legi mian kronikon.

"Kverko, 8 decembro 1876, etendiĝo norde kaj sude 57 futoj, ĉirkaŭ mezuro ĉe tero 7½ futoj, oriente kaj okcidente 53 futoj, 2 futoj super la tero 5½ futoj, sub unua branĉo 5¾ futoj."

Oni antaŭ nelonge denove min mezuris, kaj vi povas konstati, kiom mi kreskis dum la lastaj 47 jaroj.

—Etendiĝo norde kaj sude 87½ futoj, oriente kaj okcidente 84 futoj; ĉirkaŭ mezuro ĉe tero 11½ futoj, 2 futoj super la tero 9¼ futoj, sub unua branĉo 9¼ futoj.

—Kaj se ne okazas io neatendata mi vivos longe, post kiam tiu ĉi generacio estos pasinta.

—Memoru ĉiam la belecon kaj utilecon de la arboj, kaj ne forgesu tiun belan poemon "Hakisto, kompatu tiun arbon."

Tradukis R. B. Bigelow.

El "Victorian School Paper."

HALL'S BOOK STORE

'Phone : Windsor 6081.

Books and Music bought at your home.

Specialist in Secondhand School and College Books.

Secondhand Music.

Full Stock of Esperanto Books.

264 CHAPEL STREET,

— PRAHRAN —

(Opposite Town Hall).

Libraries Valued.

Agent for "LA SUDA KRUCO."

LETERO AL AMIKO EN EU'ROPO.

Estimata Sinjoro,

Per tiu ĉi letero mi penas interesi vin pri la kanguruo, kurioza besto kiu troviĝas sole en Aŭstralio, kiun oni nomas marsupilo, klaso de mamuloj, kies inoj posedas sur la ventro poŝon, kien sin metas la ido. La kanguruo per sia forta vosto staras rekte sur la du postaj kruroj, au antaŭen saltas per longaj salto, sed kiam ĝi manĝas la herbon, malrapide iras per la kvar membroj.

S-ro Wheelwright en sia libro, "Wanderings of a Bush Naturalist," priskribas la duoninsulon, Mornington,—kies plejproksima parto nun estas antaŭurbo de Melburno, sed antaŭ sepdek jaroj, kiam li loĝis tie kune kun la indiĝenoj, estis erikejoj, verdaj kampoj, kaj praarbaroj, kaj tie li diras.

Troviĝis pli da kangurooj ol en iu alia parto de Aŭstralio, ili troviĝis en aroj de kvindek ĝis cent, kaj kvankam la kamarado kaj mi nur ĉasadis, dum la vintroj de du jaroj ni mortigis pli ol du mil, kaj kvankam mortigis tiel multaj ni ne povis rimarki la perdon en la nombroj, kiuj ankoraŭ restis. La plej granda, kiun ni mortigis, mezuris naŭ futojn kaj duonon de la nazpinto ĝis la vostfino, kaj pezis ducent tridek funtojn, kaj la vosto pezis dudek funtojn.

De la mortigitaj kangurooj ili vendadis en Melburno al la viandistoj, nur la du grandajn krurojn, kaj la voston, kaj por kvindek funtoj da viando ili ricevis nur du ŝilingoj kaj ses pencoj. El la vosto estas farata tre bongusta supo.

S-ro Wheelwright ankaŭ diras,—Estas eraro pensi, ke la kanguruo estas facile ĉasebla. Laŭ flarpovo, vidpovo, kaj aŭdpovo ĝi egalas la cervon, kaj kvankam la irmaniero estas tiel malsimila, la kanguruo plirapide kuras por unu mejlo ol la cervo. Post kelkaj komencaj salto la kanguruo saltas pli ol tridek futojn je ĉiu salto

dum ĝi forkuras de persekutanta malamiko. Krom la homoj kaj liaj hundoj, la indiĝenaj hundoj "Dingos" estas la solaj malamikoj de la kanguruo.

S-ro Donald Macdonald en sia libro "Gum Boughs and Wattie Bloom," diras.

Tiel plirapide forkuras la kangurino, ol la virkanguruo, dum la someraj monatoj kiam la tero estas malmola, ke la hundo kiu estas spertata pri la kanguruo-ĉasado, ciam elektas ĉasi la plihele koloratan virkangurumon, kvankam laŭ sperto li jam scias, ke estos tre eble, ke post longa daŭra kurado li devos batali kontraŭ tre kuraĝa, sindefendema malamiko.

En la vintro, kiam la tero estas mola, post pluvadoj, la kanguruo tre ofte falas, kiam forkurante ĝi penas ekiri flanken, kaj estas tiam, kiam la ĉasisto, kiu volas mortigi tiel multe, kiel eble de la kangurooj por havigi al si la gratifikacion . . . kiun pagas la registaro en kelkaj partoj de Aŭstralio, kie la kangurooj estas multnombraj, kaj formanĝas la herbon, kiun oni bezonas por la ŝafoj . . . kun la helpo de siaj hundoj, mortigis la kanguroojn po centoj.

En la venonta leteron mi plue priskribos la kangurumon, se plaĉas al vi. Via fidele, P. H.

MORTOJ.

D-ro Henry Bartlett, Naskita en Foulsham, Norfolk, en 1843, kuracisto multjare en Norwood, li vojaĝis alilanden ĉ. 1910, kaj fine en 1920 ekloĝis en Auckland, Novzelando, kie li mortis 31 Aug., 1923. Fraŭlo, filantropo, iom ermita, pli ol ordinare inteligenta, li interesiĝis pri multaj movadoj por la homara progreso. Li testamentis £100 al la B.E.A.

El British Esperantist.

THE - CHOCOLATE - BOWL

18 Centreway

Collins Street, Melbourne

'Phone 2210

Best quality Chocolates, Nougats, Fudges, Marshmallows, Candies,
4, 5 and 6 oz., 1/-.

Fancy Boxes, 10/- upwards.

Aĉetu de Samideano!

KRONIKO.

Melburno, V.—La Esperantistoj de Melburno kunvenis en la ĉambro de la Esperanto-klubo ĉe 19 strato Russell, merkredon 23 julio. La okazo estis koncerto por ŝveligi la kason de la venonta kongreso. Nia movado estas feliĉa pro tio, ke inter la anoj estas tiom da talentuloj, sed bedaŭrinde, la du fraŭlinoj kiuj ĉarmis la aŭdantaron, ne uzis la karan lingvonoble ili ne volis esti tro ĉarmaj! La tri viroj, kiuj kantis, montris ke ili havas belajn voĉojn kaj ankaŭ ke Esperanto estas tre muzika lingvo. Du amuzaj teatraĵoj estis prezentitaj. "La Gasto," el la franca lingvo, tiklis la aŭskultantojn kaj la malnova Aŭstralia Esperante verkita paradiso je melodramo, "Dum si Vivis" au "Dufoje Mortigita," kiel kutime ridegigis la novajn kaj malnovajn Esperantistojn. La Kaso de la Kongreso gajnis £4/14/9 pro la vespero. Ĉu ni ne povos havi similajn vesperojn dumonate ĝis la kongreso.

Sidnejo, N.S.K.— Esperanto inter Radiistoj estas tre populara nuntempe. Pluaj kluboj invitis la S.E.S. sendi paroladantojn por klarigi la misteriojn kaj faradojn de nia lingvo al iliaj membroj. Ĉe "Marrickville Radio Club" S-ro D. Calnan parolis pri "Esperanto aplikigata al Radio" je la 7 julio, ĉe "Leichhardt Radio Society" S-ro J. N. Edmonds helpita de S-ro F. T. Simon informis larĝan aŭdantaron pri "La rilato de Esperanto al Radio" je la 15 julio, kaj en Northbridge la parolanto estis S-ro F. V. Taylor. Aliaj paroladoj estas projektataj.

"Daily Telegraph," "Evening News," "Labor Daily" (ĉiutagaj ĵurnalo) kaj "Wireless Weekly" (senfadena semajna ĵurnalo) enhavis artikolojn pri Esperanto kaj Radio reprezentitaj el "International Language," Londono.

En la klubejo de la Sydney Esperanto-Societo, S-ro J. N. Edmonds regalis la anojn kun instrua lekcio

titolitan, "Idiomo," traktante fremdajn lingvojn kaj komparante ilin kun nia internacia. Du semajnojn poste Fraŭlino Ethel Lee parolis pri ŝia vojaĝo tra Nov-Zelando, kiun ŝi ilustris per bildlanterno.

La konsilantaro de la Modernaj Lingvaj Asocio donis permeson komenci Esperantan fakon sub ilia protektado. La sekretario de la Sydney Esperanto-Societo aranĝas detalojn. Esperanto nun staras sur sama bazo kiel franca, germana, hispana kaj itala lingvoj kaj havos reprezentanton en la konsilantaro.

IN GENEVA SCHOOLS.

The Government of Geneva Republic and Canton report on the compulsory instruction of Esperanto in the upper grade of the Elementary School curriculum, says that the boys and girls have learned to read and write Esperanto after a nine months' course (two lessons a week); and that this has had a good effect on the study of the grammar of the native language.

HELP TO ADVERTISE ESPERANTO.

50 envelopes of good quality, print with above design, can be had for 1/- from Melbourne Esperanto Society, Hardware Chambers, 350 Little Collins St., or send your order to Box 731 Elizabeth St. P. O.

PHILLIP ISLAND**"Redcliffs," Newhaven.****The Ideal Tourist Resort.****6 hrs. from Melb. by boat and rail.****Accommodation for 50 Guests.****First Class Table.**

Good Piano, Spacious Bathrooms, Croquet Lawn, Tennis Court, Good Boating, Fishing, Swimming and Shooting. Picnic Parties Arranged. Esperanto Spoken in the House.

E. S. BIGELOW, "Redcliffs," NEWHAVEN, PHILLIP ISLAND.

CONSTITUTION OF THE AUSTRALASIAN ESPERANTO ASSOCIATION.

Name.—The name of the Association is "The Australasian Esperanto Association." The name in Esperanto is "La Australazia Esperanto-Asocio."

Objects.—The objects of the Association are:—(i) The promotion of the use of Esperanto, the Auxiliary International Language compiled by the late Dr. Lazaro Ludoviko Zamenhof. (ii) To assist organisations propagating Esperanto. (iii) To arrange and or manage Congresses of Esperantists. (iv) To arrange for the representation of the Association at Universal and other Esperanto Congresses and affiliation to Esperanto Organisations. (v) To promote the formation of Groups for the use or study of Esperanto.

Organization.—The association shall consist of State Groups, State Branches, State Councils and Federal Council.

State Groups.—Each group shall consist of at least seven members. Each group shall elect its own office bearers annually at its last meeting in June, otherwise each group shall manage its own affairs. All the groups in each State affiliated with the A.E.A. shall form the State Branch of the Association.

State Councils.—The President and Secretary of each group shall form the State Council without election and shall meet monthly. The State Council may elect any member of the Branch to the Council, in an advisory capacity only.

Election of Branch Officers.—The State Councils shall at each annual meeting in July elect its office bearers for the ensuing year.

Federal Council.—The States' General President and General Secretary shall automatically become the Council of the A.E.A., also any officer appointed by the Council, such as President, Editor of "Suda Krucio," etc., who may be elected from outside the Council.

Officers of A.E.A.—The Council of the A.E.A. shall elect the officers of the Association as follows:—President, Secretary, and Treasurer, Editor of "Suda Krucio," and any other officers necessary to conduct the affairs of the Association.

Functions.—The functions of the

State Councils shall be to conduct any business pertaining to its own State. The functions of the Federal Council shall be to conduct any business delegated to it by the State Councils or as set out in clause 2 "objects."

Membership Fees.—The membership fee of each group shall be determined by its members.

Association Expenses.—Each State Branch shall pay 1/- per group per annum to the expenses of the Federal Council.

Official Organ.—The "Suda Krucio" shall be the official organ of the A.E.A. and shall be conducted by such officers as shall be appointed by the Federal Council. Each State shall accept pro rata responsibilities for the upkeep of the journal "La Suda Krucio."

Annual Reports and Balance Sheets.—The annual report and balance sheet of each State shall be presented to the annual meeting of the State Council. After adoption copies of each report shall be forwarded to the Secretary and Treasurer of the Association, who shall in turn compile the Association annual report.

The Report and Balance Sheet of the Association shall at the earliest opportunity be presented to each councillor of the A.E.A., and after approval, to each State Council for adoption.

B.E.A.—The Association shall be affiliated to the British Esperanto Association. The B.E.A. shall not be liable for any expenditure incurred in the name of the A.E.A.

Expenditure.—No liability shall be incurred in the name of the Association by any person without the authority of the President and Treasurer of the A.E.A., nor in the name of any Branch without the authority of the President and Treasurer of the Branch.

Alteration of Constitution.—The constitution may only be altered by a majority of the States' councillors.

INTER KNABOJ.—Ĉu vi tima pugnabatali kontraŭ mi? Senkura ĝulo!

—Mi ne timas vin, sed mian patrino.

—Sed ŝi ne divenos, ke vi pugnabatalis.

—Nu, kiam oni vokos kuraciston por kuraci vin, ŝi nepre scios tion.

RECENZO.

Reĝo Lear, (King Lear), de William Shakespeare; el la Angla tradukis A. L. Curry kaj A. J. Ashley. La eldonejo estas "The Vicarage, Farnley Tyas, apud Huddersfield, Anglujo," kien mendoj devas esti sendataj al Pastro A. J. Ashley. Prezoj estas, kartonita, 2.5 ŝilingoj, tolbindita, 3.6 ŝilingoj, numerita kaj subskribita de la tradukintoj, 4.5 ŝilingoj.

Doktoro Bradley, iama profesoro de poezio, ĉe la Universitato de Oxford, en sia libro pri la tragedioj de Shakespeare, diras, "Foje kaj refoje" "Reĝo Lear" estis aklamata la plej majesta verko de Shakespeare kaj la plej bona el liaj dramoj, la tragedio en kiu li plej genie montris siajn diversajn, mirindajn povojn." Ĝuste pro tio, la traduko altrudis grandajn malfacilojn. La lingvaĵo de la freneza reĝo estas ŝvela kaj grandioza, tiu de la spitisto la lingvaĵo de la needukita, dum la vortoj de Cordelia estas dolĉaj, kortuŝantaj ĝis la plej alta nivelo. Eble pro tio, kvankam ses el la dramoj de la granda Anglo jam estas tradukitaj, la plej korsiranta, plej geniula, plej grandioza restis ĝis nun netuŝita. S-roj Curry kaj Ashley elfaris tre fidelan tradukon plene konservante la ritmon kaj belsonecon de la originalo.

Jen la unua parolo de Cordelia:—
Vi,

bona sinjoro mia, min naskigis,
edukis kaj amadis: mi konvene
repagas tiujn devojn, vin obeas,
vin amas, kaj altege vin honoras.
Miaj fratinoj edzojn havas: kiel—
se ili vin amas? Eble, kiam
mi edziniĝos, portos for la edzo
kun mia ĵur' duonon de l'zorgad'
kaj amodev'; niam mi edzino
fariĝos, nur la patron elamante,
kiel fratinoj miaj.

Jen la pasia eksplodo de la turmentita maljuna reĝo, kiam li plene konsciigas pri la sendankeco de siaj du nenaturaj filinoj:—

Ho, blovu, ventoj! viajn vangojn fendu!

Tromboj kaj kaskadegoj ŝprucu vi,
ĝis akvo kovros turojn, dronos
kokojn!

Sulfaraj fajroj, kiel pens' rapidaj,
antaŭgvar-di' de l' fulmo kverkfendanta,

tuŝu per fajro mian blankan kapon!

Vi tondro ĉiotremiganta, frapu
la dikglobecon de la ter' platige!

kaj la matricojn de l' naturo fendu
samtempe ĉiujn semojn detruante,
kiuj fariĝas homoj nedankemaj!

Por la informo de ne—Angloj, la antaŭparolo estas mallonga skizo de la vivo de Shakespeare kaj cito el la kritikaĵo de "Reĝo Lear" skribita de Charles Lamb, la fama angla aŭtoro.

La libro estas tre bone presita kaj rimarkinde korekte kompostita, ĉar nur tri negravaj preseraroj sin trudadas.

Multaj el la vortoj uzitaj de Shakespeare estas nun iom araikaj kaj nefacile kompreneblaj, do legado de ĉi tiu traduko klarigos ec por multaj Angloj la dubajn punktojn. Tre inda de legado estas "Reĝo Lear," kaj la elektemaj, poeziemaj Esperantistoj estas varme rekomenditaj rapidi al la plezuro kiu atendas ilin (CWB).

ANONCOJ.

Fraŭlineto, komencanto, volas korespondi poŝtkarte kun aliaj komencantoj. Adreso F-ino Edna Creswell, c/o Hobart Esperanto Group, 324 Macquarie St., Hobart.

S-ro M. J. Ravelick, G.P.O., Auckland, New Zealand, deziras korespondi per letero aŭ poŝtkartoj kun ĉiuj landoj.

B.E.S.—ADRESARO

5th Edition now to hand, 1/-.

6th Edition: Register your name among the Esperantists of the world.
Price, 1/-.

Australian Agent: A. R. Cohen, 224 Barker's Road, Glenferrie, Melbourne.

VITAMIN.

Nature's remedy for physical and nervous exhaustion and disorders. . .
See testimonials.

For Children and adults.

Price per packet: 3/8 posted.

Australian Agent: A. R. Cohen, 224 Barker's Road, Glenferrie, Mel-

GAZETOJ RICEVITAJ.

Ĉiuj gazetoj por la Suda Krucio devas esti adresitaj al Box 731 P.O., Elizabeth Str., Melbourne.

Amerika Esperantist, n-ro 2; Amik-eco, n-ro 1; Arbeid-Esperantisten, n-ro 1; British Esperantist, n-ro 230; Bulgara Esperantisto, n-ro 9; Bulteno De L' 2a. Kongreso, n-ro 4; Esperanto Triumfonta, n-roj 192, 193, 194, 195; France-Esperanto, n-ro 28; Internacia Komercio, n-ro 12; Inform-servo de la Internacia Labora Oficejo 59, 60-61; International Language, n-ro 5; Literaturo, n-ro 22; La Interligilo de L' P.T.T., n-ro 6-7; Le Monde Esperantiste, n-ro 1; Litova Stelo, 2-5; Progress, n-ro 202; Pola Esperantisto, n-ro 3-4; Revuo, n-ro 5; Sennacieca Revuo, n-ro 9; Volker Spiegel, n-ro 9; Wereldtall, n-ro 1.

GRUPOJ FILIIĜITAJ AL A.E.A. (Prezidanto: sinjoro W. H. King, Wellington, Nov-Zelando.)

Sydney: Esperanto-Societo. Kunvenas ĉiun ĵaŭdon de 7.30-10 p.m. ĉe "Station House," Rawson Place (6a etaĝo). Guste apud la ĉefstacidomo. Prezidanto: S-ro. F. V. Taylor; sekretario, S-ro. L. E. Fosto, adreso. "The Brighton," Croydon Park, Sydney.

Melburno Esperanto-Societo, Prezidanto, s-ro C. L. Clarke; sekretario, s-ro J. G. Robert. Poŝta adreso, Box 731, Elizabeth-str. P.O., Melbourne. Kunvenejoj: Hardware Chambers, 350 Little Collins-str.; vendrede vespere, je la oka horo.

A.N.A.- Grupo, Oakleigh. Prezidanto: sinjoro W. Quinlivan; sekretario, sinjoro D. Thomson, poŝta adreso: ĉe British Imperial Oil Co., 153 William-str., Melbourne. Kunvenejoj: Mechanics' Institute, Oakleigh, lunde vespere je la oka horo.

Berwick: Esperanta Grupo. Kunvenejoj kaj poŝta adreso: ĉe F-ino P. Abbott, "Chelsworth," Normanby Rd., Berwick, merkrede je 3.30 p.m.

Dargaville: Esperanto Societo. Prezidanto, S-ro Alfred Gregory. Sekretario, S-ro R. Pope. Poŝta adreso, P.O.; Dargaville, N.Z. Kunvenejoj: la legosalono de S-ro A. Gregory, vendrede vespere, je la sepa.

"Iru Antauen"-Grupo. Prezidanto: S-ino E. S. Bigelow. Sekretario, S-ro J. Parker. Poŝta adreso, Warrigal Rd., Oakleigh. Kunvenejoj: 36 Kangaroo Rd., Oakleigh, marde vespere je la oka horo.

"Nigra Cigno"-Grupo. Prezidanto: S-ro E. J. Goody, Sekretariino F-ino F. Cherrett. Poŝta adreso, 46 Leonard str., Victoria Park, W.A. Kunvenejoj vespere je la oka horo "Perth Academy," komencantoj merkrede; progresintoj, 9 Pier-str: ĵaŭde.

Persista Grupo, Armadale, Melbourne. Prezidanto: S-ro H. Byatt. Sekretariino: F-ino I. Thomas, Kunvenejoj kaj poŝta adreso, 62 Northcott Rd., Armadale, merkrede vespere, je la oka horo.

Whangarei Grupo Esperanta. Prezidanto, S-ro D. Tilly. Sekretario, S-ro Chas. Waymouth. Poŝta adreso, ĉe S-ro Chas. Waymouth, strato Manse, Whangarei, N.Z. Kunvenejoj: La domo de S-ro Tilly, strato Water, Whangarei, vendrede, je la oka horo vespere.

Raciista Esperanta kaj Diskuto Grupo. Prezidanto, sinjoro J. Skurrie; sekretariino, fraŭlino B. Adamson. Poŝta adreso, 673 Canning-str: North Carlton, Melbourne. Kunvenejoj, Temperance Hall, Russell-str: Melbourne, ĵaŭde je la sepa horo.

Hebarta Esperanta Grupo. Kunvenejoj: Eaton-Bray-lernejo, Davey str.; ĉiun duan mardon, 7.30 vespere. Prezidantino F-ino C. M. Hannaford. Sekretario kaj poŝta adreso F-ino A. Beckett, 177 Davey-str.; Hobart.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— Send for —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.